

QUANCO

2/02

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO



Oficiala Organo de
Kuba Esperanto-Asocio
13a jaro, n-ro 4 (2/2002)
Aperas 4-foje jare

Eldonas:
Kuba Esperanto-Asocio
Poŝtfako 5120,
10500 Havano, Kubo
Telefonaĵoj: ++53(7)53 9102
kaj 40 4484
Fakso: 33 8729
Retadreso:
kubesp@ip.etecsa.cu

Ĉefredaktoro:
ALBERTO GARCÍA FUMERO

Revizias kaj kontrolas:
MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

Enpaĝigo:
ALBERTO GARCÍA FUMERO
ALBERTO FDEZ-CAJENES BARRIOS
ROBERTO MOLINA GÁLVEZ

Prezo: (enlande) CUP 1.00
(eksterlande), EUR 2.00
aŭ 2 irk., pagendaj al la
UEA-konto: keax-u.

Ĉiuj rajtoj rezervitaj
Reproduktado permesata
(bv. indiki la fonton kaj
sendi du ekzemplerojn al
la Redakcio).
Interŝanĝo dezirata.

La kovrilo:

La sidejo de KEA, unu el
la plej gravaj atingoj dum
tiuj ĉi jaroj, obligas ĉiujn
agadojn de la Asocio en
la tuta lando. Sur la foto,
parto de la akceptejo kaj
libroservo. Foto: Juan R.
Rodríguez

estimataj

Jen novaj ŝanĝoj! Nia kom-
postisto, Alberto F. Calienes,
konvinkis nin pri plua anali-
zo de la aspekto de Avan-
co, kaj de nun ĝi aperos kun
tute nova, kaj ni diru, ŝmin-
kita, vizaĝo.

Mi konfesas, ke, al kutimi-
ta al la jam de jaroj tradicia
formato de nia bulteno, mi
timis pri la perdo de "kultu-
ra identeco", ĉar estas scia-
te, ke legantoj ne tro favo-
ras drastajn ŝanĝojn en siaj
preferataj legaĵoj. Sed tuj mi
konstatis, ke la rezulto de la
proponoj estas plibonigo de
la legebleco kaj pli profesia
aspekto. Do, ni adiaŭis nian
tradician kovrilformaton kun
nostalgio sed sen bedaŭro.

Ankaŭ ni pensis pri tio, ke
en niaj tirkestoj troviĝas

multaj kontribuajoj, kiuj ris-
kas ne plu esti aktualaj,
kaze ke ili ne aperu jam en
tiu ĉi numero. Sed kompre-
neble la paĝoj ne estas
elastaj, kaj mankas spaco.
Pro tio vi konstatos, ke kuti-
maj rubrikoj ne aperas. Sed
ne timu, ne temas pri novaj
ŝanĝoj... tio validos nur por
la nuna numero!

Via ĉefredaktoro,
Mag. ALBERTO GARCÍA FUMERO

enhavo

23a Datreveno de KEA

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ / JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ 3

Esperanto malfermis pordojn

JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ 5

Pioniro de Esperanto en Kubo

JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ 8

La principo de ofteco en lingvo-instruado

JULIAN HERNÁNDEZ ÁNGULO 9

Imagu

JOHN LENNON 11

Organizo de la internacia E-movado

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ 12

Vidalvide kun...

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ 14

Kiam datreveno signifas faktoj...


Datrevenoj ofte pensigas nin pri la trairita vojo, foje optimisme, foje male, tamen estas momento oportuna por sin demandi ĉu la celo staras antaŭe aŭ se nia vojo deflankiĝis iagrade. Pro tio ĉi tiu 16an de junio signis por ni tian momenton, kaj ni decidis sekvi la tradicion festi ĝin laŭ diversaj manieroj kaj laŭ la eblecoj.

En la jaro 1979 grupo de entuziasmuloj finfine sukcesis je la celo fondi kuban asocion por arigi la tiamajn esperantistojn kaj interesitojn pri Esperanto. Oni iniciatis kursojn, klubajn vesperojn kaj informan laboron kiu laŭ la tempopaso fariĝis konstanta, planita kaj persista. Keiĉfoje niaj revoj ne realiĝis kiel dezirate, sed plejofte ni suk-

cesis je gravaj kaj historiaj okazaĵoj kiel la Iberamerika Konferenco Esperanto 88, la 75a UK en 1990, kvar naciaj kongresoj, kulturaj festivaloj, seminarioj por apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, informaj kaj instruaj seminarioj kaj pluraj aliaj renkontiĝoj naciaj kaj regionaj. Do, tiaj faktoj jam apartenas al la historio juna, sed suka, de nia nuna KEA.

Pro ĉio ĉi nia devo estas daŭrigi antaŭen kaj ĉiam profiti la okazon por memori tiun tagon kiam la fondintoj renkontiĝis por festi la naskiĝon de nia asocio.

Inter niaj taskoj cele al tiu ĉi datreveno, la Informa Fakto de KEA organizis gazetar-konferencon en la nacia sidejo de la



Guste antaŭ 23 jaroj, la 16an de junio 1979, en Saĵono "Antonio Maceo" de la Havana Kapito, sidejo de la Kuba Akademio de Sciencoj, fondiĝis Kuba Esperanto-Asocio. Sur la podio, de maldekstre, Pedro F. Lamas, tiama prezidanto de UEA, d-ro Reynaldo de la Noya, d-ro Bustamante, ambaŭ en reprezento de KAS; inĝ. Andrés Rodríguez, unua prezidanto de la Asocio, Mario L. Garrido, funkciulo de la Kuba Komunista Partio; kaj Serafin Marrero, membro de la preparokomitato poste elektita estrarano. Foto: Arkivo de KEA.

asocio, kiun partoprenis ĵurnalistoj el gravaj amaskomunikiloj de la lando, nome la nacia gazeto *Juventud Rebelde*, la Nacia Informa Agentejo (AIN) kaj la nacia radiostacio Radio Rebelde, krome venis ĵurnalistoj de la internacia informa agentejo Prensa Latina kaj la radiostacio Radio Metropolitana. Ili multe demandis pri la lingvo, pri la monda lingvoproblemo, ni informis pri la Komunikadcentro en Bruselo kaj pri la utiligo de la lingvo por diskonigi la kuban realon kaj specife pri nia agado por disvastigi la veron rilate al liberiga kampanjo okazanta en kaj ekster Kubo favore al kvin kubaj junuloj maljuste enkarcerigitaj en Usono. La rezulto estis tre pozitiva tiel ke aperis informoj en diversaj radiostacioj kaj en la menciita ĵurnalo kiu estas vaste legata tutlande.

Aliflanke, en la sidejo situanta centre de Havano okazis nia solena kultura vespero omaĝe al la datreveno de KEA kun partopreno de plurdeko da esperantistoj plus invititoj kaj amikoj de Esperanto. Okazis kultura vespero, solenaj vortoj, deklamado, kantado kaj dancoj prezentitaj de infanaj grupoj kiuj lernas la lingvon. Partoprenis ankaŭ franca esperantistino Christine el Tuluzo. Estis preskaŭ centoj da personoj kiuj renkontiĝas ĉiujare okaze de la fond-datreveno. Ankaŭ la libroservo funkcias dum la vespero, kiu cetere estis pluva kaj humida.

En la orienta parto de nia arkipelago, specife en urbo Santiago de Cuba oni tre solene festis tiun ĉi okazon tiel ke oni malfermis Fakan Salonon en la municipa biblioteko "Abel Santamaría" laŭ propono de la provinca direkto de kulturo kiu dum pluraj jaroj ja estas firma ŝubtenanto de la movado en tiu urbo. Oni jam havis stokon da libroj donacitaj de la asocio en la jaro 1992, kio estis la startpunkto, plus nova donaco de aliaj valoraj libroj kaj eĉ gaze-

toj, krom privataj donacoj faritaj de esperantistoj de Santiago. La dato elektita estis dimanĉo la 23an de junio kaj por la okazo vojaĝis al Santiago de Cuba la ĝenerala sekretario de KEA Juan Ramón Rodríguez kaj la estrarano pri Kulturo kaj Disvastigo Julián Hernández. La inaŭguran ceremonion ankaŭ partoprenis reprezentantoj de la provinca kaj municipa direkto de kulturo kaj la provinca direkto de justico. Ankaŭ la provinca estraro de KEA gvidata de Gonzalo Collantes kaj la prezidanto de la provinca grupo de Guantánamo, Raúl Sánchez.

Krome, okazis kultura prezento kiun partoprenis profesiaj artistoj, nome Cristina Delisle, soprano, kaj Georgina Almanza, aktorino, kiuj interpretis, respektive, la kanton *Danza Náŭiga* kaj la poemojn *La Vojo* de L. Zamenhof kaj *Mi iris Santiagon* de Federico García Lorca.

Aliaj artistoj amatoraj ankaŭ prezentigis, Juliano kantis ŝatatajn kanzonojn de la esperantistoj kaj dancensemblo ankaŭ prezentis diversajn dancojn.

Temis pri ege riĉa kaj signifoplena okazaĵo kies estontaj sekvoj multe dependos de la provincaj esperantistoj. Certe oni jam parolis pri la bezono trejni la personaron laborantan en la esperanta salono, pri kursoj por la laboristoj, kaj tre grave, la kultura instanco ofertis la eblecon ke esperantistino trejniĝu pri bibliotekologio por estonte profesie labori en la biblioteko. Tio ja estos bonega pruvo pri la utileco de nia lingvo.

Se ni serioze cerbumas pri niaj faroj kaj farendoj, ni certe konsciiĝos pri la multaj potencialoj kiuj ekzistas en nia movado kaj pri tio ni ne rajtas kontentiĝi, sed konstante alstrebi nian celon.

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ
JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ

Esperanto malfermis pordojn



La Librofoiro Sankta Domingo 2002 (25a de aprilo-5a de mayo) donis ŝancon al Kuba Esperanto-Asocio plenumi kelkajn celojn rilatajn al disvastigo kaj plifortigo de Esperanto en tiu lando, kaj speciale en la direkto informadi la ĝeneralan publikon pri la IL.

Dum 11 tagoj, la KEA-reprezentantoj – Alberto Rodríguez Pineda (28/04-04/05) kaj Juan R. Rodríguez Gómez – havis la okazon ne nur ekspozicii librojn kaj gazetojn, sed ankaŭ vendi kelkajn el ili, disdoni centojn da propagandiloj paroli kun tiuj kiuj

demandis pri la afero (pli malpli dek potaĝe) ekde diversaj vidpunktoj, sperti ĝeneralan mankon da informoj en rilato kun Esperanto, kaj kontakti kun kelkaj kulturaj institucioj, de la lando kaj de la regiono.

Inter la homoj kiuj vizitis nian standon starigis malsimilaj gradoj da konscio kaj kono pri la IL: ekde tiuj, kiuj sciis nenion pri ĝia ekzisto, ĝis aliaj misinformitaj aŭ duoninformitaj, eĉ kiuj simple pensis, ke tiu ideo jam delonge mortis. Tio postulis de ni longajn kaj ĝisdetalajn informojn kaj klarigojn eĉ, kelk-



Centoj da homoj vizitis nian standon kaj interesiĝis pri Esperanto. Foto: Alberto Rodríguez.

foje, ekestis interesaj debatoj kaj dialogoj, kies ĉefa rezulto estis gajni interesitojn lerni E-on kaj trovi personojn pretajn apogi la po-
resperantan agadon en tiu lando.

Ene de tiu ĉi lasta grupo elstarigas s-ro Víctor Santos, posedanto de Librovendejo kiu deziras lerni E-on kaj ekde nun bonvenigos tie interesitojn pri la IL kun la celo ke tiu kultura institucio estu lernejo kaj sidejo de E-o en Sankta Domingo. Mi liveris al li la adreson de tiuj kiuj montris intereson dum la Librofoiro, sed krome li jam propagandas la aferon kaj esperas malfermi kurson tie venontseptembre. Cele al tio, oni donacis al li stokon da materialoj, i.a. tiujn de nia perkoresponda kurso surbaze de *Sabe Ud. Esperanto?* (teksto kaj kasedoj), krom *Baza vortaro por komencantoj*, *Karlo*, *La tuta Esperanto*, muzikkasedoj, ktp., kaj la-
sis tie aliajn ekzemplerojn por vendi inter la membroj de la grupo

S-ro Santos veturigis min al Santiago de los Caballeros, kaj tio donis al mi du pliajn

ŝancojn. precizigi kelkajn detalojn en rilato kun E-o en Sankta Domingo. kaj kontaktigi lin, persone, kun Rafael Despradel, instruisto de la loka grupo, kaj grava helponto de la alia. Nia ĉefa interkonsento: havi oftajn kontaktojn pere de ĉiuj eblaj rimedoj.

En Santiago de los Caballeros

Vizito al la dua plej grava urbo de la lando permesis al mi ne nur renkontigi kun s-ro Despradel (unuafoje okazis en Zagrebo, dum la UK), sed ankaŭ kun sia grupo, piejparte gejunuloj, kiuj entuziasme lernas E-on kaj kapablas uzi ĝin. Duhora dialogo kun ili estis la plej bona ekzemplo de tio.

Ili interesiĝis pri diversaj aferoj en rilato kun la IL: historio, kulturo, estonteco, la movado nuntempe en la mondo (ĉefe en Ameriko aj speciale en Kubo), la konsisto de la UK-oj kaj Tutamerikaj Kongresoj, la eblecoj viziti nian landon dum la 6a TAKE (21a-27a de marto 2004), ktp.



Gejunuloj lernas kaj parolas Esperanton, en Santiago de los Caballeros. Foto: Juan R. Rodríguez.

Sendube temas pri grupo kun sufiĉaj kapabloj, eĉ por disvastigi la aferon en Santiago de los Caballeros kaj en aliaj partoj de la lando aŭ eksterlanden, ĉar montras fortojn, agemon, entuziasmon kaj energiojn por tion fari. Inter ili lernas haitiano (Johano Paulo), kiu ege deziras kontribui kun la agado por Eo en sia lando, post sia reveno. Espereble, li apogos la laboron de Christine Theane en Portoprince kaj aliaj lokoj.

Por tiu grupo mi portis donacon de Kuba Esperanto-Asocio, konsistanta je libroj, gazetoj, kasedoj kaj aliaj esperantaj. Mi ankaŭ liveris al s-ro Despradel kelkajn materialojn vendotajn al la gelernantoj.

Akompanata de Rafael, lia frato Jorge kaj lia fianĉino Asela, mi havis la plezuron viziti la urbojn Montecristi (ege fama inter ni pro dokumento grava por la sendependeco de Kubo subskribita tie en 1895) kaj Dajabón, kie mi konis la landlimon kun Haitio.

Ĝeneralaj konsideroj

Tiu ĉi vizito iris rekte sur kampo kie, de antaŭ kelkaj jaroj, KEA intencas labori: etendigi la poresperantan agadon en la kariba regiono kaj, ĝenerale, en la kontinento ĉefe pere de kulturaj institucioj. La Librofoiro de Sankta Domingo montris ke tiu vojo ankaŭ validas por Esperanto, ĉar ĝi permesis diverstipajn kontaktojn, kaj la eblecon malfermi novajn pordojn ne esplorataj ĝis nun.

Unuafoje alilandaj esperantistoj vizitis Dominikan Respublikon kun la celo labori por E. kaj unuafoje ankaŭ, ke membroj de KEA vojaĝis eksterlanden kiel parto de ŝtata delegacio, kio signifas rekonon al nia enlanda laboro kaj plifortigon de publikaj rilatoj niaj kun la aliaj 17 kubaj institucioj kiuj membris tiun oficialan reprezenton. Do, rezultoj estis ambaŭflanke. Konklude, Esperanto gajnis.

JUAN RAMÓN RODRIGUEZ GÓMEZ



La aŭtoro en la domo kie estis subskribita la Manifesto de Montecristi en 1895. Foto: Rafael Despradel

Pioniro de Esperanto en Kubo



▲ Fernando Ortiz, komenco de la 20a jarcento.

Faksimilo de "El lenguaje universal",
kie aperas ambaŭ proponoj.

Tre gravan rolon en la diskonigo de Esperanto nialande ludis d-ro Fernando Ortiz, elstara intelektulo tutmonde konata pro siaj studoj rilataj al sociologio, etnologio, juro, folkloro...

En marto 1906, sub la titolo "El lenguaje universal" kaj per la pseŭdonimo D-ro Novemo (kio per si mem donas ian scipopvon de la lingvo), Ortiz publikigas en la *Jurnalo El mundo ilustrado* serion da artikoloj tre objektivaj per kiuj li, analizante ĉiujn "por" kaj "kontraŭ", prezentas la IL-on al la ĝenerala publiko. En tiuj artikoloj, la aŭtoro proponas fondi *Kuban Societon por la Propagando de Esperanto* kaj ankaŭ, revuon, kiun li baptas *La Kuba Stelo*.

Ambaŭ ideoj fruktodonas eĉ samnomaj: en januaro kaj februaro 1909 aperas en Santiago de Kubo la gazeto *Kuba Stelo*, kiel oficiala organo de Kuba Esperanta Societo (KES), la unua E-organizaĵo en la lando: kaj la 1an de januaro 1910 naskiĝas, en Havano, Kuba Societo por Propagando de Esperanto (KSPE), kiu utiligis la reton da kluboj kaj delegitoj jam organizita de KES.

JUAN RAMÓN RODRIGUEZ GÓMEZ

Es de esperar que también en Cuba se introduzca y extienda el conocimiento y uso del lenguaje de Zamenhof—como en las demás naciones cultas—y que dentro de poco podamos contar con una KUBA SOCIEDAD POR LA PROPAGANDO DE ESPERANTO y una revista *La Kuba Stelo*.

DOKTORO NOVEMO.

La principo de ofteco en lingvo-instruado

Unu el la ĉefaj elementoj de ajna kurso estas la lernomaterialo, ĉar ĝi estas la bazo por disvolvi la kapablojn de la lernantoj. Kiam temas pri lingvo-instruado, la instruisto tre bone devas elekti la lernomaterialon konsiderante kaj la lingvistikajn aspektojn kaj la komunikajn funkciojn. Por tion fari, oni devas sekvi la principon de ofteco. Ofteco en Esperanto devenas de la adjektivo ofta kaj ofta, lingvistike parolante rilatiĝas kun lingvo-uzo-frekvenco.

Dum la evoluo de lingvo oni povas rimarki ke ties fruaj parolantoj eknomis fenomenojn kaj aĵojn kiuj okazis kaj estis ĉirkaŭ ili per diversaj vortoj. Ju pli ili uzis difinitajn vortojn por nomi aĵojn, agojn, fenomenojn, kvalitojn, ktp. des pli tiuj vortoj fariĝis necesaj, nepraj kaj kompreneble oftaj. Ofta uzado de difinitaj nocioj aŭ vortoj igis ilin supervivi la tempon kaj postvivi generaciojn de tiuj lingvo-uzantoj.

Tiuj vortoj, gramatikaj kaj lingvaj kiuj oni plej ofte uzas en la ĉiutaga interkomunikiĝo, ĉu parola, ĉu skriba, fariĝas la kerno de ajna lingvo.

Kiam instruisto desegnas la kurson, se temas pri metodikisto, li, laŭ la celoj de la kurso, devas elekti la lernomaterialon konsiderante la principon de ofteco.

Kursoj povas esti bazaj, superaj, aŭ specialaj laŭ la celoj. En bazaj kursoj, oni ĉefe instruas plej oftajn lingvaĵojn. Neoftajn kaj maloftajn lingvaĵojn kaj aliajn detalojn, oni instruas en superaj kaj specialaj kursoj por ke la lernantoj pliregu kaj posedu la celatan lingvon.

En la sepdekaj jaroj de la pasinta jarcento aperis metodo por instrui lingvojn pli efike kaj fruktodane. Ĉi tiu metodo estas la komunika kaj ĝi sufiĉe multe devojiĝis de la tradiciaj metodoj por instrui lingvojn. La komunika metodo kaj ĝiaj pluraj variantoj ne plu emfazis lernadon de gramatikaj reguloj, konceptoj kaj vortolistoj. Ĝi ĉefe emfazas la lernadon kaj scipovon de komunikaj funkcioj. Ĝi celas lingvan, kulturalan, socian kompetentecon flanke de la lernantoj.

Se la Esperanto-instruantoj deziras sukcesigi siajn kursojn de lingva kaj metodika vidpunktoj, ili devas kongruigi la instruadon de la internacia lingvo kun la nunaj tendencoj kaj variantoj de la komunika metodo.

Komunikaj funkcioj estas tre gravaj aspektoj de la komunika instruado. Ili estas intencoj kiuj igas la homojn interkomunikiĝi por rilatiĝi kun la socio aŭ por ricevi iun bezonatan informon. Konsiderante la novajn instrutendencojn, la instruistoj elektu la lernomaterialon surbaze de la plej ofte uzataj komunikaj funkcioj. Tiaj komunikaj funkcioj ebligas precizigi tiujn lingvistikajn aspektojn kiuj plej nepras kaj bezonatas.

En la bazaj kursoj de la internacia lingvo, a lernantoj devas lerni kiel saluti diversmorte; demandi kaj respondi pri sanstato; nomi objektojn, fenomenojn, agojn; priskribi personojn, objektojn, situaciojn; demandi kaj respondi pri objekto, aĵo, afero, persono, kvalito, agmaniero, loko, kaŭzo, tempo, kvanto; kompari, opinii pri io; ktp.

Ne eblas scipovi la supremencitajn funkciojn sen lernado de nocioj kaj esprimoj ofte

uzataj de ni kiel: "Bonan matenon", "kiel vi fartas?", "la libro estas interesa", "kio estas tio?", "kia estis la filmo?", "kiam vi revenos?", "kion vi faris nieraŭ?", "mi pensas (kredas, opinias) ke...". ktp. Ni rememoru ke nocio estas la plej elementa kaj baza lingvo-nivelo. Pli superaj lingvoniveloj estas la frazo, la paragrafo kaj la teksto, ĉu parola, ĉu skriba. De gramatika vidpunkto, nocioj dividiĝas en vorto-specoj aŭ klaŝoj; ili estas artikolo, substantivo, pronomo, adjektivo, verbo, adverbo, prepozicio, konjunkcio kaj subjunkcio. Plej gravaj el ili estas la substantivo, la adjektivo kaj la verbo, ĉar pere de ili oni nomas aĵojn, fenomenojn, priskribas ilin, kaj nomas diversajn agojn kaj aferojn. Ili estas enhavovortoj, ne riavortoj kiaj la artikolo, la prepozicioj kaj la konjunkcioj.

Pro la trajto de Esperanto, ni ne praktikas la adverbojn, ĉar la plej multaj agmanieroj deriviĝas el adjektivoj aldonante al ties radiko la literon "e".

Dum la instruado de la diversaj funkcioj, la instruisto emfazas substantivojn, adjektivojn kaj verbojn. Ĉirilate li ankaŭ elektu kiujn instrui unue, kiujn instrui due kaj kiujn poste laŭ la principo de ofteco. Pro tio, oni dividi la kurson en periodoj aŭ etapoj kaj praktikigu tiujn vortojn laŭ ŝtupoj tie, ke la lernantoj pli bone komprenu kaj lernu ilin. La instruisto ne estu tre ambicia dekomence. Li multe konsciu pri la nombro da lecionoj instruendaj kaj la tempo disponebla.

En la kazo de substantivoj, oni prioritatu nociojn kiel patro, viro, libro, domo, kato, arbo, suno, seĝo, tablo, ĉambro, mateno, tago, vespero, ktp. Ne bezonatas ke la lernantoj dekomence lernu substantivojn kiel veziko, hepato, dosiero, koto kaj aliaj ne ofte uzataj.

Se temas pri adjektivoj, oni instruu unue: bela, granda, alta, juna, grava, forta, nova, utila, interesa, ktp.

Lernantoj lernu pli frue verbojn kiel: farti, loĝi, navi, trinki, manĝi, iri, paroli, kompreni, ktp.

La instruisto ĉiam pensu pri la diversaj ŝtupoj de la kurso kaj ke ne eblas instrui kaj lerni ĉion dum la unua periodo. Li ne malesperigu kaj ne tro ambiciu. Iom post iom la lernantoj alproprigos al si funkciojn kaj nociojn por atingi la bezonatajn celojn.

Tiel kiel oni pritraktas substantivojn, adjektivojn kaj verbojn laŭ uzofrekvenco. Oni ankaŭ prioritatu oftajn vortojn inter la diversaj vortokategorioj. Prepozicioj kiel: en, sur, sub, per, kun al, pri, por, de, ktp., kaj konjunkcioj kiel: kaj, sed, ktp.

Oni prioritatu korelativajn vortojn, participojn aktivajn, afiksojn kaj kunmetaĵojn pli ofte uzatajn. El la tri akuzativaj kazoj, oni emfazas tiun de rekta objekto kiu estas la plej grava.

Pro la trajto de la Esperanto-stilo, oni instruu kaj emfazas kunmetaĵojn por ke la lernantoj estu konsciaj pri ties valoro dum uzado de la internacia lingvo.

Temoj pli oftaj kiujn la instruistoj devas praktikigi siajn lernantojn estas tiuj rilataj al la familio, la domo, la urbo, la lando, la homa korpo, la lernejo, vizito al zooparko, vizito al vendejo, renkontiĝo kun alilanda esperantisto, E-aranĝoj kaj eventoj, elstaraj esperantistoj, ktp.

El la kvar kapabloj, oni prioritatu la parol- kaj skribkapablojn. Paroli estas produktiva kapablo kiu postulas tujan reagon de la persono alparolata. La interparolantoj ne havas longan tempon por organizi siajn ideojn kaj produkti fluan kaj korektan lingvan kodon, pro tio instruistoj trejnu siajn lernantojn kiel eble plej multe por ke ili sukcese disvolvu tiun ĉi kapablon.

Pro la fakto ke ni, kubanoj, loĝas en insulo kaj ne facilas por ni vojaĝi eksterlanden kaj havi internaciajn spertojn en kongresoj, eventoj, renkontiĝoj kaj alispecaj aranĝoj, instruistoj forte laboru por ke la lernantaro

bone cisvoivu la skribkapablon ekde la unuaj lecionoj, tiel la kursanoj povos havigi al si alilandajn kaj aliprovinciajn amikojn pere de korespondado kaj interŝanĝi opiniojn kaj ideojn pri diversaj temoj. Sendube por ni, kubanoj, tiu ĉi estas la ŝlosilvojo por utiliĝi la internacian lingvon kaj daŭre nutri kaj stimulan esperantistecon. Por multaj el ni, korespondado estis kaj estas la ŝlosilo kiu malfemis pordojn kaj fenestrojn al internaciaj rilatoj kaj kontaktoj.

Tiuj ĉi estas la plej gravaj aspektoj kiujn mi volis analizi en tiu ĉi artikolo en rilato kun la principo de ofteco. Instruistoj nepre estu tre konsciaj pri ili ĉar se ni, instruistoj, ne sekvas tiun ĉi principon, ni perdiĝas en

granda amaso da vortoj, gramatikaĵoj kaj aliaj lingvaĵoj kaj ne bone gvidas la lernantaron al la celoj de niaj bazaj kursoj. Instruistoj bone rimarku tion kaj klopodu ke la lernantoj lernu tiujn ĉi aspektojn, kiuj estas plej oftaj ĉar tiel ili, de la komenco, utiliĝos kaj uzos la lingvon kaj tiujn lingvaĵojn plej ofte uzatajn. Se la instruistoj ne sekvas tiun principon, ili perdas la du semajnajn instruohorojn. Ili daŭre konsciu ke ekzistas bazaj, superaj kaj specialaj kursoj.

Mi esperas, ke pere de tiuj ĉi vortoj, mi konsciigis la instruantojn kaj instruontojn pri la graveco sekvi kaj respekti la principon de ofteco dum lingvoinstruado.

JULIÁN HERNÁNDEZ ANGULO

Imagu (1971)

*Imagu nin sen ĉielo,
post klopod' sukcesos vi,
sed Infer' sub niaj piedoj
kaj nur steloj super ni.
Imagu ĉiujn homojn
gajaj pro feliĉ'...*

*Imagu nin sen landoj,
ne hezitu pro la pen'
neniu hom' mortigenda
pro ia religia dev'.
Imagu ĉiujn homojn
vivaj kaj en pac'...*

*Vi ja pensas min revulo
sed jam estas pluraj pli.
Mi esperas vin aniĝi,
ek la mond' al unuig'.*

*Imagu nin senmonaj,
certu, ja facila task',
sen malsat', sen avaremo,
en fratsento la homar'.
Imagu ĉiujn homojn
pretaj por donad'...*

*Vi ja pensas min revulo
sed jam estas pluraj pli.
Mi esperas vin aniĝi,
ek la mond' al unuig'.*

JOHN LENNON (1940-1980)

Tradukis:
Dario Rodríguez (Hispanio)
(Ricevita el Interreto)


Organizo de la internacia Esperanto-movado (I)

Per serio da tekstoj pri la temo ni celas ke la legantoj de Avanco havu konstantan fonton de konoj pri nia movado, kio certe kontribuos al senĉesa pliklerigado de nia membraro tra la tuta lando.

Enkonduko

Kiam Zamenhof en 1887 depost longa elprovado, transdonis sian verkon al la publiko, li ne imagis kiel plej efike progresigi la IL-on, kiel varbi adeptojn, kiel konservi kaj laborigi varbitojn. Tamen, dekomence li konsciis pri baza antaŭkondiĉo por disvastiĝo de Esperanto: Jam en la unua libro li deklaris ke, "por ke lingvo estu universala, ne sufiĉas nomi ĝin tia". Unu jaron poste, li

precizigis ke la *Unua Libro* servu nur kiel komuna fundamento, ke la proponita lingvo "devas vivi, kreski kaj progresi laŭ la samaj leĝoj, laŭ kiuj estas ellaborataj ĉiuj vivaj lingvoj" Rezignante ĉiujn personajn rajtojn pri sia projekto, Zamenhof konsideris sin ne kreinto, sed nur iniciatanto de la lingvo. Ekzistis diversaj vojoj kiuj estis prezentitaj dum pluraj intencoj al organiziĝo. Zamenhof multe strebis por doni animon al la lingvo celante inspiri al ĝi la ideon de



Boulogne-sur-Mer, Francio. Teatro kie sesilis la 1a Kongreso de Esperanto en 1905.

egaleco de ĉiuj nacioj, de internacia frateco interpopola. Ĝuste tiu spirita bazo de Esperanto, la tiel nomata interna ideo pruvis sian potencon dum la postaj jardekoj, helpante venkigi la lingvon.

En la jaro 1888, la Amerika Filozofia Societo intencis submeti Esperanton al internacia kongreso de kleruloj por ekzameniĝo, post komdamno al Volapük, kaj Zamenhof akceptis tiel ke li preferis ne havi personan influon en la posta evoluo de la lingvo kaj lasi tion al internacia kongreso: sed la projekto fiaskis pro manko de interesitoj. Post tiu bato, li direktis sian atenton al fortikigo de la propraj vicoj, per literaturaj verkoj, unuaj provoj de praktika uzo kaj modera apelacio al idealismo.

1888-1908

Intertempe formiĝis la unuaj lokaj grupoj en Nuremburgo, kie la tuta volapükista klubo transiris al Esperanto. Krome aperis kluboj en Odeso, Moksvo, Sofio, Malago, Varsovio kaj aliaj. Multaj rusoj aliĝis al la lingvo.

Inter kelkcento da diverslandaj adeptoj, kiuj antaŭe nur povis korespondi kun Zamenhof, ekde la unua de septembro 1889 servis kiel tre efika ligilo kaj kuraĝigilo la revuo *La Esperantisto*, aperinta en Nuremburgo. En ĝia tria numero Zamenhof proponis la kreon de Tutmonda Ligo de Esperantistoj "kiel sola kaj absoluta leĝdonanto en nia afero", al kies decidoj li promesis sian submetiĝon. Sed pro miskomprenoj kaj troa individuismo en la juna movado, kiu timis aŭtoritatecajn ŝanĝojn en la lingvo, oni ne akceptis la organiziĝon. Tiumpe floris diversaj proponoj pri lingvaj reformoj, kiuj ĉesis en novembro 1894 kiam klara plimulto voĉdonis kontraŭ ĉiaj lingvaj ŝanĝoj, metante per tio finan punkton al senĉesa diskutado, kaj ekde tiam, turnis sin al diligenta varbado kaj verkado. La espe-


rantistoj ekpaŝis sur alia vojo, sin organizante laŭteritorie kaj anstataŭigante la mankantan internacian ligilon per pli forta apogo al idealismo. Laŭ tiamaĵ statistikoj en 1892 ekzistis 1 500 enskribitaj esperantistoj taksante la nombron da lernintoj je 15-20 mil. Literaturaj verkoj kaj gazetoj forĝis la komunan spiriton, tamen, ĝis la fino de la 19a jarcento Esperanto restis esotera lingvo de apenaŭ rimarkebla grupeto de poeziemaj idealistoj. Nova erao, la t.n. franca aŭ propaganda periodo komenciĝis kun la sursceniĝo de Louis de Beaufront, kies vera nomo estis Louis Chevreux (1855-1935), tre verŝajne la unua franca esperantisto. Oni konsideras ke De Beaufront savis Esperanton el plena izoliĝo. Li fariĝis la unua celkonscia propagandisto, enkondukante metodojn de sistema reklamado kaj zorge klopodante eviti identigon de la lingvo kun pacifismo. La Societo por Propagando de Esperanto kiun li fondis en 1898 estis formale internacia, kun individuaj membroj kaj al ĝi aliĝis preskaŭ ĉiuj gravaj eksterlandaj esperantistoj. Ĝi havis dulingvan organon *L'Esperantiste*, kiu populariĝis ankaŭ en la publiko. Tiu societo servis kiel modelo por ĉiuj alilandaj societoj, kiuj fondiĝis rapide unu post alia. Kvankam la rapida kresko de la Movado dum la franca periodo estas nedisigeble ligita al De Beaufront, baldaŭ rimarkiĝis negativaj sekvoj de lia agado kiel organizanta kaj leĝdonanta estro, kiu preskaŭ en monopola pozicio gvidis la esperantistojn, elvokis ĉe ili senton pri eliteco kaj emon troigi kaj fanfaroni. Malaperis la antaŭe oftaj voĉoj de dubo kaj malespero, cedante sian lokon al optimistaj certigoj. Sed aldone al tio komenciĝis eksterproportia perkonsulto ĉirkaŭ Zamenhof, nomante lin Nia Majstro, kion evidente Zamenhof ĉiam evitis pro sia konata pozicio rilate la lingvon.

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ
(daŭrigota)

Vidalvide kun...

Okaze de mia vizito la 5an kaj 6an de aprilo, al filio Camagüey en la orienta parto de nia insulo, mi estis invitita partopreni specialan aranĝon organizitan de la grupo de Cascorro ene de la Semajno de Kulturo en Guáimaro kie oni muntis ekspozicion pri E-

libroj kaj gazetoj. En Cascorro instruas esperantisto kun riĉa historio en nia movado. Mi profitis la okazon por iel ne tute formale intervjui lin kaj tiel gajni por nia historio interesan ateston pri unu el la Honoraj Membroj de KEA, nome Ricardo Salazar Crespo.



S-ro Salazar Crespo (maldekstre), kune kun la E-Grupo de Cascorro. Foto, Arkivo de KEA

M: Mi ŝatus ke vi respondu klasikan demandon en nia medio, ĉar vi estas rekonata nialande de la malnovaj samideanoj, sed ni ne multon scias pri viaj unuaj paŝoj en la movado, do, kiel vi fariĝis esperantisto?

S: Mi komencis studi la lingvon aŭtodidakte, sed miaj unuaj kontaktoj kun la lingvo okazis pere de sinjoro Víctor Rodríguez Cofigny en Florida. Li tiutempe jam havis korespondamikojn en multaj landoj. Tio okazis en la jaro 1965 kiam mi estis 17 jaraĝa.

M: Kiel vi konatiĝis kun Raúl Juárez kiu jam aktivis en Camagüey?

S: Iutage okazis ekspozicio pri Esperanto en Florida, kie mi loĝis tiutempe kaj mi partoprenis. Tie mi renkontiĝis kun Raúl Juárez, nuna Honora Membro de UEA kaj de KEA. Sinjoro Juárez donacis al mi libron de E-kurso per kiu mi daŭrigis la studadon tute sola.

M: Kaj kiam vi komencis utiligi la lingvon?

S: Unu jaron poste aperis mia adreso en korespondpetoj de la revuo *Paco* kaj tiamaniere komenciĝis mia korespondado kun multaj esperantistoj tra la mondo. Tiutempe mi ankaŭ renkontiĝis kun la alia piliero de nia movado en la regiono, sinjoro Pedro Pablo Lamas el Ciego de Ávila, same Honora membro de UEA kaj de KEA, kiu ankaŭ donacis al mi kurson preparitan de li mem. Dum multaj jaroj daŭris mia perkorrespondanta interŝanĝo.

M: Kiam okazis viaj unuaj kontaktoj kun KEA?

S: En la jaro 1979 mi konatiĝis kun Andrés Rodríguez en Havano. Mi estas membro-fondinto de KEA kaj mi havas atestilon pri tio, kvankam mi ne memoras ĉu mi fi-

zike partoprenis la fondan aranĝon, sed mi jam estis en kontakto kun li, kiu estis la unua prezidanto de la nuna asocio. Poste mi restis atenta pri ĉiuj agadoj de la asocio kaj mem laboris en mia urbeto.

M: Kiam kaj kiel vi estis elektita HM de KEA?

S: Do, por mi estis surprizo. Kiam mi vojaĝis al Havano por partopreni la unuan kongreson de KEA en 1987, tiam mi sciis ke laŭ propono de Raúl Juárez, la komitato elektis min HM de KEA, kaj tiel estis anoncote en la kongreso mem. Reverinte hejmen mi intensigis mian agadon en Cascorro kaj daŭre malfermis kursojn. Ni sukcesis krei grupon en la 80aj jaroj kiu funkciis sufiĉe bone.

M: Kion donis Esperanto al via vivo? Kial vi restas en la movado?

S: Do, per Esperanto mi havis ekde mia eta urbo en ĉi tiu parto de la insulo pli vastan horizonton. Mi partoprenis ĉiujn gravajn eventojn kaj kongresojn nialande, ankaŭ la 75an UK-on. En 1998 mi estis invitita partopreni la UK-on en Montpeliero, kaj mi faris rondvojaĝon tra Hispanio kaj aliaj eŭropaj landoj. Per Esperanto mi havis la okazon kontakti ne nur kun esperantistoj, sed ankaŭ kun neesperantistoj amikoj de esperantistoj, kiuj memoras organizaĵojn kiel la Ordeno de Malto en Hispanio kaj Francio. Ili sendis materialajn kontribuojn al Cascorro, tio estas, medicinaj materialoj kaj medikamentoj por poliklinikoj kaj aliaj institucioj pri sano. Danke al tio, Esperanto en mia loĝloko estas ankaŭ rekonata kiel ligilo por efektiviĝi solidarecon.

M: Dankon!

Intervjuis:

MARITZA GUTÉRREZ GONZÁLEZ

La voĉo de Kubo en Ameriko



HORO UTC	M	KHZ	REGIONO
07.00	31	9820	Okcidenta Norda Ameriko kaj Pacifika Azio
15.00	25	11760	Tuta Ameriko kaj Karibio
19.30	21	13715	Eŭropo kaj Mediteraneo
22.00	21	13715	Eŭropo kaj Mediteraneo
23.30	25	11760	Tuta Ameriko kaj Karibio
23.30	49	6070	Tuta Ameriko kaj Karibio

Oni povas aŭdi nin per Real Audio ĉiudimanche je la 15a horo UTC.
tio estas laŭ la internacia horarsistemo per la jena adreso:

<http://216.138.240.229/rc4>

Kaj per la servilo de Aŭstria Radio:

http://roi.orf.at/esperanto_demand.html

Ni petas al vi sendi raportojn pri aŭdebleco al la jenaj adresoj:

radiohc@fp.etecsa.cu aŭ esperanto@rhc.cu

Radio Havano Kubo, Poŝfako 6240, Havano, Kubo



3a Seminario pri Informado

Santiago de Cuba
20a-22a.09.2002

3A NACIA INFANRENKONTIĜO

GUANTÁNAMO

19A-21A DE JULIO 2002

KANTOJ,
DANCOJ,
TEATRO,
DEKLAMADO,
KAJ...

ĈIO EN ESPERANTO!